


FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA
kaj de PATRONA ASOCIO "LEXICON SILVESTRE" R.A.

No. 60 Eberswalde, 2011-05-15
(Esperanta versio)

D-ro Karl-Hermann Simon mortinta



Je la 28a de marto 2011 d-ro Karl-Hermann Simon pace forpasis post longa malsano. Li estis multjara prezidanto de Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.a. kaj iniciatinto de la 1981 estiĝinta multlingva forstfaka vortaro.

Ni funebras pri saĝa, varmkora kaj honesta homo, kiu ĉiam vivos plu en niaj koroj kaj fare de sia verkado.

La funebra solenaĵo okazis je la 21a de aprilo, 13.00 horo, en la kapelo de la tombejo en Eberswalde, la sepultado tuj poste en (tomba) ripozarbaro de Eberswalde.



Foto: Stefan Pank

La lasta forsta loko, kun kiu d-ro Karl-Hermann Simon laŭ sia revo de nun eterne estas forte ligata, hela de sunradioj trafluata fagarbaro, karesata de milda refreŝiga vendeto, arbaro, bananta sin en blankbrileta maro el anemonj.

La internacia lingvo Esperanto en "Lexicon silvestre"¹

de Karl-Hermann Simon

Rimarko de la redakcio

Post la morto de nia estimata d-ro Karl-Hermann Simon ni opinias tre grava, konatigi lian riĉecon da idearo kaj multspeciajn ideojn, koncerne al Lexicon silvestre. Tial ni decidiĝis presi unu el liaj eseoj, ĉi-foje pri la rolo de Esperanto en Lexicon silvestre, por elmontri tiel al la mondvaste dissemiĝintaj multaj kunlaborantoj la rangon kaj la gravecon de Esperanto ĉe la terminologia laboro pri nia komuna verko.

0 Antaŭparolo

En la lastaj jaroj oni raportis en vico da prelegoj pri la laboro pri "Lexicon silvestre", plurlingva forstfaka vortaro kaj leksikono (vidu speciale "Forstista Informilo" – IF) kaj ankaŭ en fakrevuoj oni atentigis pri tiu ĉi verko per artikoloj kaj recenzoj². Post kiam en 1996³ aperis kiel 5a lingva volumo de "Prima pars" en Esperanto kun la subtitolo "Vortaro de Forsta Fako. Esperantlingva parto (I/eo) kun difinoj", ŝajnas konvena, klarigi la rolon de tiu ĉi planlingvo kadre de la "Lexicon silvestre"-projekto; des pli multe, ĉar dum pli ol dek jaroj en forstsciencaj rondoj en Eberswalde konserviĝis la impresoj, ke ni laboras pri Esperanto-vortaro.

1 Esperanto kiel la kaŭzinta faktoro

La motivo por tiu ĉi okupiĝo pri la forstfaka lingvo respondis al la bezono de kelkaj forstistoj, kiuj okupiĝis dum la libertempo pri Esperanto. "Internacia Lingvo" nomis en 1887 la pola okulkuracisto d-ro Zamenhof⁴ tiun de li kreita lingvo. Jen estis forstistoj, kiuj intencis apliki tiun ĉi lingvon ankaŭ por la interŝanĝo de ideoj kun siaj fremdlingvanaj fakaj gekolegoj. sed montriĝis, ke en la multaj Esperanto-vortaroj ne troviĝis iu ajn atentigon pri la forstfaka lingvo. Tio ne ŝajnas mirinda rilate tiun relative junan lingvon, kies nombro da uzantoj nur estas en kvanto de unu miliono kaj inter ili la nombro da forstistoj estas mikroskopa. Post unua prezentiĝo de fakprelegoj de du forstistoj dum Esperanto-konferenco en ĈSSR en aŭgusto 1981, sep forstistoj el kvin landoj interkonsentiĝis en la jaro 1982, ke ili komencu la laboron pri forstfaka vortaro. Ili decidis, ke la gvida centro estu en Eberswalde, kie troviĝas kaj ampleksa fakbiblioteko kaj granda nombro da forstfakaj kompetentuloj. Dekomence estis klare, ke oni kreu plurlingvan vortaron, kiu ne servu sole al esperantistoj, sed en kiu ankaŭ svedoj povu trovi la germanan tradukon kaj ĉeĥoj la hungaran tradukon de serĉita fakvorto. Oni konsciiĝis ankaŭ pri la laŭnombra amplekso de pluraj miloj da fakvortoj en unu lingvo. Krome: Ĉiutage novaj nocioj kaj terminoj ekestas kaj jam en kelkaj landoj pejzaĝuzado kaj naturprotektado komenciĝas izoli sin kiel apartaj instruaj sciencofakoj for de la tradicia forsta fako. Sed neniu el tiuj 7 geforstistoj havis iu ajn spertojn, kiel oni komencu tian laboron. Post mallonga tempo montriĝis, ke – pro la polisemio de multaj fakterminoj – oni ne povas trovi unusignifajn ekvivalentojn en alia lingvo sen pli detala klarigo de la respektiva fakvorto. Tial ankaŭ la proponoj al la verkotaj esperantlingvaj terminoj estis tre heterogenaj.

La plua laboro estis tre riĉigita per partopreno en terminologia kurso, kiun aranĝis la Esperanto-Asocio de CSSR kune kun Terminologia Centro (TEC) de UEA⁵. Estis esperantistoj, kiuj dum la dudekaj kaj tridekaj jaroj de nia jarcento fondis la terminologian sciencon. Ankoraŭ estas rigardata kiel normiga verko la disertacio de Eugen WÜSTER "Internationale

¹ Aperis germanlingve en: Ulrich Becker (1997, Red.), *Terminologiewissenschaftliche Aspekte der Interlinguistik. Interlinguistische Informationen, Beiheft 2*, Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 13-15 (R).

² La plej gravaj kontribuaj aperis en la 2010 eldonitan jubilean libron okaze de la 80a naskiĝtago de K.-H. Simon "Lexicon silvestre – kontribuoj pri la multlingva vortaro de la forstfako". Krome aperis: Karl-Hermann Simon/Jacques Maheut: "Un nouveau dictionnaire forestier multilingue" en *Revue forestière française* XLVII (1995) n-ro 4, p. 405-407; Karl-Hermann Simon (1993): "Lexicon silvestre – ein neuartiges Forstwörterbuch". En: *Beiträge zur Forstwirtschaft und Landschaftsökologie* 27, n-ro 1, 43-44; kaj recenzo en *Centralblatt für das gesamte Forstwesen* 113 (1996), N. 3-4; lafoje ankaŭ aperis sciigoj pri la Vortaro en gazetoj, ekz. je 2008-oi-21 en „Neues Deutschland“ (Berlin) sub la titolo „Der Dolmetscher der Forstwissenschaftler“ (La interpretisto de la forstsciencistoj) (R).

³ Ĝuste estas 1995, tiel Simon 1995 (R).

⁴ Pri internaciaj planlingvoj ĝenerale kaj speciale pri Esperanto, komparu D. Blanke 2006 (R).

⁵ Universala Esperanto-Asocio, sidejo Rotterdamo (R).

Sprachnormung in der Technik, besonders Elektrotechnik. Die nationale Sprachnormung und ihre Verallgemeinerung“ (1931) (Internacia lingvonormigo en tekniko, speciale en elektrotekniko. La nacia lingvonormigo kaj ĝia ĝeneraligo). Laŭ tiuj ideoj nur en 1983 komenciĝis la laboro pri la vortaro-projekto sur firma scienca bazo. Tio signifis, ke oni plenumu la sekvajn laborpaŝojn unu post la alia :

- Limigo de la fako
- Listigo de la nocioj laŭ kategorioj
- Fiksado de la nocio-sistemoj
- Difinado de la nocioj
- Nomado de ĉiu nocio per termino

2 Esperanto, la gvidlingvo de “Lexicon silvestre”

De nun fariĝis kompreneble, ke terminologia prilaboro de faklingvo postulas enorman preparan laboron, tio kaj je internacia nivelo kaj kadre de ĉiu etnolingvo. Vortaro nur povas esti – por tiel diri – la fina rezulto de tiu laboro.

Nun ankaŭ koncepteblis, kial la grandioza projekto de IUFRO⁶, de Internacia Asocio de Forstfakaj Esplorinstitutoj, kaj de FAO⁷ el la sesdekaj jaroj rilate la prilaboradon de “Multilingual Forestry Terminology Series” (Multlingva Forstfaka Terminologia Serio) estis blokita. Ĝis nun oni eldonis sole la volumojn en la angla, franca kaj itala lingvoj. Kiel elirbazo oni elektis anglajn fakterminojn, kiujn oni kompletigis per komentarioj. Kongruaj numeroj en ĉiuj lingvoj estis la ligo inter la diversaj lingvo-volumoj. Jam ĉe la franca versio evidentiĝis, ke simpla traduko ne eblas. Internacia interkompreniĝo pri nocioj kaj nociosistemoj ne okazis. Estis malfacile, kongruigi la – por tiel diri – nature kreskiĝintajn naciajn faklingvojn kun iliaj plursencaj terminoj. La laboro pri nocioj kaj nociosistemoj en la internaciaj fakgrupoj de IUFRO, kiel kompetentaj organoj, tiam restis kaj pleje ankoraŭ restas komenciĝanta. La “Lexicon”-projektgrupo, intertempe kolektantaj ĉiujn esperantlingvajn forstistojn ĉirkaŭ si, konsciiĝis pri tio, ke terminologia prilaboro eblas nur por Esperanto(versio). Oni devis ekfunkciigi memstaran verkadon de nociosistemoj kaj -difinoj, utiligante la ekzistantan literaturon kaj inkludante ne-esperantlingvajn kompetentulojn. Estas kompreneble, ke oni ne povis plenumi tiun laboron laŭ la teorie fiksita sinsekvo de la supre menciitaj 5 laborŝtupoj. La necesaj laboroj, plenumotaj sole per honorofica agado, postulis multajn kompromisojn. Determinita principo ĉiam restis: Eliropunkto ne estas terminoj, sed nocioj kaj iliaj difinoj. Dum la ellaborado de la nociodifinoj estas konsultata germanaj, anglaj, francaj, hispanaj, ĉeĥaj kaj svedaj publikaĵoj. Montriĝis, ke ofte estas komplika, formuli koncizajn sed unusencajn difinojn.

Ĝis 1983, rilate la laboron pri la vortmaterialo, la difino en Esperanto estis plej grava, kaŭze de la kunlaborantaro, al kiu apartenis nur esperantistoj. Poste pliampleksiĝis tiu kolektivo. Konforme al la eblecoj de la gekunlaborantoj la difinoj nun estas samtempe aŭ poste tradukataj samsence ankaŭ en aliajn lingvojn, ne sole elirante de Esperanto, sed ankaŭ de la germana aŭ aliaj lingvoj. Sed ĉiam denove oni devas kontroli la tradukitajn versiojn baze de la Esperanto-versio, por esprimi laŭeble plej ekzakte la fiksitan nocio-enhavon en ĉiu lingvo. Evidentiĝis: Inter ĉiuj lingvoj **Esperanto taŭgas plej bone por difini unusence**. Tial estas kompreneble, ke Esperanto funkcias kiel gvidlingvo de “Lexicon silvestre”. Tio gravas rekte nur por la kolektivo de la prilaborantoj. Nerekte el tio rezultas por la uzantoj pli fidinda versio de difinoj. Kelkaj uzantoj de “Lexicon” eble tute ne rimarkas tiun funkcion de Esperanto. Kompreneble la aŭtoraro intencis ĉi tiun varbantian influon de tiu lingvo kiel lingvon de la scienco, kiu rezultas el la gvidlingva karaktero de Esperanto.

Aliaflanke al la aŭtoro kolektivo dekomence komprenebliĝis, ke la interligo de “Lexicon” kun Esperanto rezultigas ankaŭ malavantaĝojn pro la ĝenerale disvastiĝinta rezerviĝemo kontraŭ tiu lingvo. Tia ampleksa verko, al kiu evoluis la origina vortarprojekto, urĝe bezonas financan subtenon. Ĝenerale oni ne skribe motivis rifuzon de petoj al instancoj rilate subvenciojn pro reverziĝemo kontraŭ Esperanto. Sole Bonna Federacia Ministerio pri Nutrado, Agrikulturo kaj

⁶ The International Union of Forest Research Organizations (R).

⁷ [United Nations]Food and Agriculture Organization (R).

Forstoj nomis en sia rifuzo “eine Übersetzung ins Esperanto für abwegig” (tradukadon en Esperanton tute malkonvena). Tia sinteno kompreneble influas la opinion de aliuloj, speciale de subalternuloj.

3 Efiko de la plurlingveco de “Lexicon silvestre” sur esperantlingvajn terminojn

Krom la prosperiga efiko de Esperanto sur unusencan nociodifinon en la diversaj lingvoj ankaŭ ekzistas, kaŭzita per la plurlingveco de la “Lexicon”-projekto, positiva efiko de la etnolingvoj sur la esperantlingvan parton de la verko. Tute normala estas la metodo, proponi por Esperanto internaciajn vortradikojn, ĝis nun ne uzitajn en la esperantolingva literaturo. Ekzemploj pri tio estas *bonited/*, *dendrokronologi/*, *dentrometri/*, *ekogeografi/*, *evapotranspir/*. Sed la forstfaka vortrezoro en landoj kun tradicia forstmastrumado entenas multajn etnolingve enradikiĝintajn terminojn, al kiuj mankas sinonimaj internaciaj terminoj. La multlingveco prezentas bonajn eblecojn, elekti taŭgajn vortradikojn por nocioj, ĝis nun ne traktitaj en Esperanta literaturo, aŭ por tre longaj terminoj. Kiel ekzemploj pri tio servu la sekvajn:

baras/ por nocioj, interligataj kun deskrapanta rezino. El la 27 lingvoj, tiutempe prilaborataj, tiu ĉi radiko troviĝas en la hispana, franca kaj rusa lingvoj kaj tial ĝi estis elektata.

bork/ por la kruda ŝelo de arboj. Tiu ĉi radiko estas konata en la germana, ĉeĥa kaj slovaka lingvoj.

femel/ por nocioj de la unuarbmaniera mastrumata malsamĝa arbaro. Tiu ĉi radiko estas dokumentata en la germana, angla, franca kaj nederlanda lingvoj.

fornir/ por nocioj pri lignaj lamenoj. Estas mirinde, ke oni trovas tiun radikon nur en la pola lingvo, kvankam similaj radikoj kiel *furni*, *faner*, *finer* estas multnombraj. Sed ĉar verŝajne ĉiuj tiuj radikoj devenas de la jam en la mezepoka metio en Italio konata *fornire*, tiuj ĉi radikoj estas proponita.

klup/ por nocioj pri la diametro-mezurilo, ĝenerale uzata en la forstmastrumado. Tio estas ekzemplo rilate al la decido ĉe kelkaj vortradikoj, proponanta sin. *klup/* estas dokumentata en 7 lingvoj, *compas/* en 5 lingvoj, *calib/* aŭ *calip/* en 4 lingvoj.

Por kelkaj Esperanto-radikoj estis proponata – pro uzo en pluraj lingvoj – aldona signifo, ĝis nun ne entenanta en PIV⁸. Tio ekz. koncernas *bosk/*, *diskont/* kaj *gradaci/*.

4 Efiko de la terminologia laboro pri “Lexicon silvestre” sur la teorion pri la Esperanto-vortfarado

La laboro pri “Lexicon” estas plenumata laŭ etapoj po ĉirkaŭ 1 000 nocioj. Oni komencis per la plej disvastiĝintaj nocioj, por kiuj jam ofte ekzistis nocionomoj en la Esperanto-literaturo. Pli kaj pli nun estas prilaborataj pli specialaj nocioj, por kiuj ekzistas en la etnolingvoj plurvortaj terminoj.

ULLRICH (1995a, 1995b) diskutis 1995 en prelego la de KALOCSAY kaj WARINGHIEN⁹ starigitajn regulojn de la Esperanto-vortfarado. ULLRICH konkludis, ke ne ĉiuokaze tiuj ĉi reguloj sufiĉas al la bezonoj de racia lingvo-logika terminofarado. Li proponis, okaze de bezono, uzi ankaŭ en Esperanto liberan vortfaradon ĉe kunmetitaj substantivaj terminoj. Ĝi estas aplikata en multaj novaj anglaj plurvortaj terminoj. En la germana lingvo oni kreas preskaŭ ĉiutage novajn vortkunmetaĵojn konforme al la bezonoj de la praktiko. En pluraj lingvoj oni konstatas plimultiĝon de tendenco al utiligo de vortkunmetaĵoj kun uzo de ligstrekoj. Pro lingvo-ekonomiaj kaŭzoj oni preferu tiujn ĉi kunmetitajn unuvortajn terminojn ankaŭ en Esperanto-faklingvo.

⁸ Plena Ilustrita Vortaro (de Esperanto), Vollständiges illustriertes Wörterbuch (des Esperanto)

⁹ KALOCSAY / WARINGHIEN (1980): Plena analiza gramatiko de Esperanto. 4a eld. UEA Rotterdam

Intencita efiko de Esperanto sur la estontan terminologian prilaboradon de la forstfaka lingvo en la unuopaj etnolingvoj.

En “Lexicon silvestre” oni uzas strikte terminologiajn principojn. La intertempe komencita eldono de partoj de “Lexicon silvestre” ne restos sen influo sur la estontan terminologian prilaboradon de la forsta faklingvo. En tiu afero oni ankaŭ ne povos ne konsideri la laboraĵojn de WÜSTER¹⁰ kaj PORTMANN¹¹. PORTMANN traktis la “ec-malsanon” en la Esperantolingvo. Li kreis klarecon pri la dusenseco de multaj mezurterminoj. Tio devas montriĝi en la normterminoj de faklingvo.

Jam estis menciite, ke sur la kampo de la forsta fako ankoraŭ longa tempo necesos – rilate al internacia terminologia laboro – por en fakgrupoj pri la unuopaj lingvoj oni povos komenci interkonsenton pri nocionomoj. La “Lexicon”-projekto donu fundamenton per la kolektado de ĝis nun uzitaj terminoj. La de ni uzitaj normterminoj por Esperanto povos helpi ĉe la fiksado de etnolingvaj normterminoj. Tiel la unuopaj forstaj faklingvoj povus esti amplekse karakterizataj per internaciaj terminoj. Do, tio povus servi al la reciproka interkompreniĝo.

5 Influo de la pens- kaj kondutomaniero de la esperantistoj sur la kombinon, labormanieron kaj laborrezulton de la aŭtoraro

Fine estu menciite, ke la laŭnombra relative granda parto da esperantistoj – ili jam delonge ne plu konsistigas la plimulton de la gekunlaborantoj – ankaŭ havas influon sur la pens- kaj kondutomanieron de la tuta aŭtoraro. La laboratmosfero ene de la aŭtoro kolektivo estas karakterizata de internacieco, evito de lingvohegemonio, libervola kaj senpaga kunlaboro, kunlaboro trans lingvolimojn ĝis la evoluigo de personaj amikaj interrilatoj.

D-ro Horst Weckwerth havas 80 jarojn!



Karaj geanoj de Lexicon silvestre! Je la 14a de junio s-ro d-ro Weckwerth solenas la 80an datrevenon de sia naskiĝtago. Tio estas por ni okazo prezenti d-ron Weckwerth iom pli detale al ĉiuj gekolegoj. Lia laboro pri nia verko “Lexicon silvestris” estu laŭde honorita!

D-ro Horst Weckwerth naskiĝis kiel dua infano de forstista familio en la forstista domo Natterheide (subdistrikto Ostprignitz). Liaj gepatroj Karl kaj Hildegard, naskita Klopsch, kiuj devis prizorgi entute tri filojn, vivis de 1936 ĝis 1966 en la forstista domo Hegermühle, kiu ankoraŭ nuntempe ekzistas apud la strato al Eberswalde. La patro deĵoris kiel distrikta forstisto de la forstodistrikto Hegermühle¹² en la forstkanton-administracio Finowtal, nuntempe Eberswalde-Finowtal. Post la meza lernejo en Finow la juna Horst frekventis la superan lernejon

(gimnazion) en Eberswalde, kie li 1950 pasigis la abiturientan ekzamenon. Post dujara metia edukado en la Forsta Entrepreno Eberswalde li fariĝis forsta faklaboristo. En 1953 li komencis la studadon de forstaj sciencoj en la Forsta Fakultato Eberswalde de Humboldt-Universitato Berlino. Ĉi tie li spertis la bonŝancon ĝui la prelegojn de la profesoroj Wagenknecht, Scamoni kaj Erteld. Bedaŭrinde Horst Weckwerth devis interrompi 1955 la studadon pro malsano. Li povis daŭrigi siajn studojn 1960, sed la fina ekzameno okazis en Tharandt, ĉar la Forsta Fakultato Eberswalde estis eliminata pro politikaj kialoj. S-ro Weckwerth realigis sian diplomlaboraĵon *Ĝisnunaj spertoj dum la apliko de la kablogruo Vlu-4 en la mezmontoj de GDR*¹³ sub la patroneco de prof. W. Hampel. Post la studado Horst

¹⁰ WÜSTER (1932, 1979)

¹¹ PORTMANN, Douglas: La mezurvortoj en la faklingvo de Esperanto: Kiel forigi la “-ec”-malsanon. Akademiaj studoj 1988-1990. Bailieboro (Ontario, Kanado). Esperanto Press, p. 227-252

¹² MILNIK, Albrecht (1993): Forstliche Grabmäher und Gedenkstätten in Eberswalde und Chorin (Forstaj tombo monumentoj memorigejoj en Eberswalde kaj Chorin), 6 p., Herausg. Brandenburg. Minist. Ernährung, Landw. u. Forsten

¹³ *Germana Demokratia Respubliko*

Weckwerth laboris unu jaron kiel forstentreprena asistanto (referendario) en Königswusterhausen. En 1966 li fariĝis kunlaboranto en Forstfaka Esplorinstituto Eberswalde, kie li ĝis 1989 laboris en la fako *Teknologio de lignorikolto*. 1977 Horst Weckwerth promociis al Dr. rer. silv. per la temo *Evoluigo de nova teknologia procedo pri mekanika junarbizaj-flegado kiel primara faligado en arbareroj de Pino*. Per tiu disertacio li esploris la eblojn de apliko kaj la labormetodikon de la senbranĉig-pak-kombajno EPAK, disvolvita en Forstfaka Esplorinstituto Eberswalde.

Ekde 1979 lia edzino Traute, naskita Pagens, akompanas nian jubileulon. Ŝi fariĝis energidona apogilo por sia edzo malgraŭ multe da tempo postulanta laboro en la medicina laboratorio de Werner-Forßman-Malsanulejo Eberswalde.

1987 d-ro Weckwerth komencis la laboradon pri *Lexicon silvestre*. Invitita al kunlaboro fare de d-ro Simon, li transprenis iom post iom la taskojn de lingvosperta kunlaboranto pri la angla kaj franca. Du jarojn pli poste d-ro Weckwerth jam apartenis kune kun d-ro Simon kaj s-ro Ingward Ullrich al la estraro de la leksikono-projekto. 1989 li gvidis la kunordigon de la ABM¹⁴-kunlaborantoj en la centralo de Ls¹⁵. Nia jubileulo estas unu el la kunfontintoj de nia Patrona Asocio "Lexicon silvestre", en kiu li kompetente kaj ĉiam fidine plenumis la taskon de trezoristo.

ANKORAŬ nuntempe, en progresinta aĝo, d-ro Weckwerth vivas tre aktivan vivon. Krom la konsekvenca laboro pri Ls li jam de 1950 partoprenas volontege en sia paroĥa komunumo en la agado de la trombonokoruso. En Eberswalde li estas konata kornisto. Jam de la infaneco d-ro Weckwerth pasie fordonas sin al la naturo kaj ĉasado.

Ni deziras al nia estimata jubileulo antaŭ ĉio multe da sano, krea forto kaj ĝojo ĉe la flanko de lia kara edzino Traute.

Nome de la estraro

Stefan Panka

KAEST - Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko


de Clivia kaj Stefan Panka



De la 18a ĝis 21a de novembro okazis en Modra Harmonia ĉe Bratislavo la 14a konferenco pri *Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST)*. La slovakaj esperantistoj Peter Baláž kaj lia organiza teamo (Education@Internet) kiel gastiganto majstris la taskon per siaj engaĝiĝo, afableco kaj la tre bona



organizado. Ĉijare 52 geesperantistoj respektive geamikoj de nia planlingvo el 15 landoj partoprenis en KAEST. La seminarioj okazis – organizitaj en laŭtemaj blokoj – samtempe en diversaj salonoj. Inter la 27 referantoj estis kiel reprezentanto de Ls Stefan Panka. Li prelegis pri la nova projekto *Lexicon silvestre en nova aspekto – Vikipedio-Projekto*. Krom prelegoj okazis multaj aliaj aktivecoj. Ili subtenis la dezirojn de la konferenco kaj la interesiĝon de la gepartoprenintoj pri kunlaboro en diversaj laborsferoj. Eblis partopreni en komputero-workshop kaj elprovi kelkajn Esperanto-programojn. Vespere eblis spekti filmon aŭ kune kanti en Esperanto. Oni povis serĉi en librokolektaĵo pri interesaj, tre prezindaj libro-ofertoj. Malgraŭ la malbona vetero multaj gepartoprenintoj partoprenis en ekskurso al ĉarma kastelokonstruaĵo en Červený. La libera tempo estis utiligata per ligado de novaj kontaktoj kaj interŝanĝo de gravaj informoj.



Peter Baláž

¹⁴ Aranĝo pri Laborhavigo per Laboroficejo

¹⁵ Lexicon silvestre



Stefan Panka kun Barbara Pietrzak de Pola Radio

Detalaĵoj pri tiu konferenco oni trovas sub <http://kaest.ikso.net> (KAEST2010). De tie oni ankaŭ povas deŝarĝi la prelegojn kaj aliajn materialojn.

Helpu al Lexicon silvestre per viaj mondonacoj !

Lexicon silvestre kreiĝas per la iniciativo de Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.a. Ĝi estas ĉefe financiata helpe de mondonacoj.

En Germanio
Sparkasse Barnim in Eberswalde
BLZ: 170 520 00
Kontonumero: 390 108 81 04

Internacie:
IBAN: DE25 1705 2000 390 108 81 04
BIC-/SWIFT-CODE: WELA DE D1 GZE


Dankon pro via subteno!

PRES-INDIKAĴOJ

Kontaktadreso:	Eldonisto/Redaktoro:
Förderverein „Lexicon silvestre“ e.V. Hochschule für nachhaltige Entwicklung Eberswalde Dr. Bernhard Götz Am Zainhammer 5 D-16225 Eberswalde Tel.: +49-3334-65 74 77 Fax: +49-3334-65 74 78 Email: kontakt@lexicon-silvestre.de Homepage: www.lexicon-silvestre.de	Stefan Panka Joachimsthaler Str. 15a D-16230 Britz Tel.: +49-3334-255 228 Email: s.panka@lexicon-silvestre.de

Ni konatiĝu!

D-ro. Lyubov Andrushko



S-ino Lyubov Andrushko (*1968), naskita en Lantschin, Ukrainio. Ŝi estas scienca-didakta kunlaborantino en Teknika Universitato en Kielce (Polando). Ĉi tie ŝi prilaboras ĉe la katedro de Ekonomiaj Strategioj ekonomiajn temojn, ĉefe sur la kampo de la forstmastrumado. Krome ŝi estas docentino. Ŝiaj gepatraj lingvoj estas ukraina kaj rusa. Krome ŝi regas parole kaj skribe la polan kaj anglan lingvojn. Post la studoj en Forsta Tekniko (1983 – 86) ŝi studis en Ukraina Nacia Forstfaka Universitato en Lwow

(1986–1991) ekonomio kaj entreprena mastrumado. S-ino Andrushko finis la studadon kun laŭdo per la laboraĵo *Ekonomio kaj manaĝado de produktado en industrio kaj forstmastrumado*. Post esploradoj en Pollando kaj Italio ŝi defendis sian disertacion pri *Koncentrado de ekonomiaj aktivecoj ekzemple de Ukrainaj Ŝtataj Forstentreprenoj*. Ekde 2011 s-ino d-ro Andrushko per siaj lingvoscioj provas akceli la laboron pri la rusa kaj ukraina tekstoj de Ls.

Sinjorino Lilianne Meier



S-ino Lilianne C. Meier (*1948) naskiĝis en la francparolanta parto de Belgio. Ekde 1977 ŝi vivas kun sia edzo kaj du infanoj en Freudenberg. En la jaro 1980 ŝi komencis sian laboron kiel tradukistino en la sekcio *Informado* de Instituto pri Forstsciencoj en Eberswalde. Ekde la ekzisto de Faka Altlernejo Eberswalde ŝi tie prizorgas la internaciajn aktivecojn de la gedocentoj kaj gestudentoj. Aldone de sia franca gepatra lingvo ŝi regas la german kaj anglan lingvojn. Ŝi ekkontaktis Ls 1985 kaj helpis ĝis

la fino de la 90aj jaroj korekti la francan version de Ls. S-ro Ingward Ullrich ŝuldas al ŝi dankon rilate la revizion de la franclingva parto de sia *Nomenclatura florum lignearum silvestrium Europae*.

Sinjorino Lena Klinkmüller



S-ino Lena Klinkmüller, naskita Medwinskaja (1967) studis medicinon de 1985 – 1990 en Kieva Bogomolets National Medical University kaj 1991 – 1996 en Humboldt-Universitato Berlino. Ŝi laboras kiel faka kuracisto pri psikiatrio kaj psikoterapio en la Malsanulejo Sankta Josefo Berlino-Weißensee. S-ino Klinkmüller estas feliĉa patrino de du infanoj kaj fordonas sian tutan libertempon al sia familio. Ŝia plej grava hobbio estas Shotokan Karate, kiun ŝi regule trejnas kune kun la infanoj kaj sia edzo kiel ekvilibron pri sia laboro kaj pro fizika forto. Ŝi regas la rusan, ukrainan kaj germanan lingvojn. Ekde 2011 ŝi prilaboras la rusan parton de Ls.

Librooferto

Gb bindita
 Ringh ringokajero
 Pb kartonita libro

ISBN	Libro bindo	Jaro de eld.	Titolo	Prezo
3-931 262 18-9	(Gb)	1997	Lexicon silvestre, Prima pars Šumarski rječnik, Hrvatski dio (I hr) a definicijama, 96 p. (Kroatische Ausgabe, 1. Teil)	15,00 €
3-931 262 20-0	(Gb)	1997	Lexicon silvestre, Prima pars Dictionary of Forest Affairs, English Version (I/en/2) with Definitions. X, 125 p. (Englische Ausgabe, 1. Teil)	15,00 €
3-931 262 22-7	(Gb)	1997	Lexicon silvestre, Prima pars Ormancılık Terimleri Sözlüğü, Türkçe Bölüm (I tr) Açıklamalı, 58 p. (Türkische Ausgabe, 1. Teil)	10,00 €
3-931 262 30-8	(Gb)	1998	Lexicon silvestre, Secunda pars Vortaro de forsta fako Esperantlingva versio (II/eo/1) kun difinoj. X, 82 p. (Esperanto-Ausgabe, 2. Teil)	10,00 €
3-931 262 32-4	(Gb)	1999	Lexicon silvestre, Secunda pars Dictionnaire de foresterie, Version française (II fr) avec des definitions, 120 p. (Französische Ausgabe, 2. Teil)	15,00 €
3-931 262 34-0	(Gb)	1999	Lexicon silvestre, Tertia pars Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (III/de/1) mit Definitionen. X, 144 p. (Deutsche Ausgabe, 3. Teil)	15,00 €
3-931 262 35-9	(Ringh)	1999	Lexicon silvestre, Tertia pars Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (III/de/1) mit Definitionen. X, 144 p. (Deutsche Ausgabe, 3. Teil)	13,00 €
3-931 262 36-7	(Gb)	1999	Lexicon silvestre, Tertia pars Vortaro de forsta fako Esperantlingva versio (III/eo/1) kun difinoj. X, 97 p. (Esperanto-Ausgabe, 3. Teil)	15,00 €
3-931 262 59-6	(Gb)	2000	Lexicon silvestre, Prima pars (Ls) Esperantlingva versio (I/eo/3) kun difinoj. X, 107 p. (Esperanto-Ausgabe, 1. Teil, 3. Bearbeitung)	15,00 €
3-931 262 60-X	(Gb)	2001	Lexicon silvestre, Secunda pars Dictionary of Forest Affairs, English Version (II/en/1) with Definitions. X, 157 p. (Englische Ausgabe, 2. Teil)	20,00 €
3-931 262 60-X	(Ringh)	2001	Lexicon silvestre, Secunda pars Dictionary of Forest Affairs, English Version (II/en/1) with Definitions. X, 157 p. (Englische Ausgabe, 2. Teil)	20,00 €
3-931 262 62-6	(Gb)	2001	Lexicon silvestre, Quinta pars Vortaro de forsta fako Esperantlingva versio (V/eo/1) kun difinoj. X, 115 p. (Esperanto-Ausgabe, 5. Teil)	15,00 €
3-931 262 67-7	(Gb)	2002	Lexicon silvestre, Prima pars Gozdarski slovar, Slovenski verze (I/sl/1) z definicijama, 61 p. (Slowenische Ausgabe, 1. Teil)	15,00 €
3-931 262 72-3	(Gb)	2002	Lexicon silvestre, Quarta pars Dictionnaire de foresterie, Version française (IV/fr/1) avec des définitions, 167 p. (Französische Ausgabe, 4. Teil)	20,00 €
3-931 262 74-X	(Pb)	2003	Lexicon silvestre, Prima pars Fjalor i pylltarise Versioni shqip (I/sq/1) me definicionet, 76 p. (Albanische Ausgabe, 1. Teil)	15,00 €
3-931 262 78-2	(Gb)	2003	Lexicon silvestre, Sexta pars Vortaro de forsta fako, Esperantlingva versio (VI/eo/1) kun difinoj. X, 81 p. (Esperanto-Ausgabe, 6. Teil)	15,00 €
3-931 262 81-2	(Gb)	2003	Lexicon silvestre, Tertia pars Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (III/de/2) mit Definitionen. X, 151 p. (Deutsche Ausgabe, 3. Teil, 2. Bearbeitung)	20,00 €
3-931 262 83-9	(Gb)	2003	Lexicon silvestre, Quinta pars Dictionnaire de foresterie, Version française (V/fr/1) avec des définitions, 194 p. (Französische Ausgabe, 5. Teil)	20,00 €
3-931 262 66-2	(Gb)	2009	Lexicon silvestre, Prima pars, Wörterbuch des Forstwesens (Esperanto-Deutsch-Polnisch) 1025 definierte Begriffe in drei Sprachen mit einem Indexteil, 359 S.	27,50 €
3-931 262 67-9	(Gb)	2009	Nomenclatura Florae Ligneae silvestris Europae (Deutsch, Englisch, Esperanto, Französisch, Latein), INGWARD ULLRICH	25,00 €
3-931 262 68-6	(Gb)	2010	Karl-Hermann Simon. Lexicon silvestre - Beiträge zum multilingualen Wörterbuch des Forstwesens. DETLEV BLANKE, STEFAN PANKA (Hrsg.)	10,00 €
3-931 262 69-3	(Gb)	2010	Lexicon silvestre, Prima pars, Wörterbuch des Forstwesens (Esperanto-Deutsch-Esperanto). 1025 definierte Begriffe in zwei Sprachen mit einem Indexteil, 300 S	26,00 €